

KOMPLETIGOJ DE LA “LISTO DE ILEI-KONFERENCOJ 1966-2015”

En **1963**, 28 Julio – 1 Aŭgusto, okazis en Beogrado la unua “Internacia Konferenco de la lernejoj en kiuj esperanto estas instruata” por studi kiel labori cele al internacia konvencio por la enkonduko de Esperanto pli vaste en la lernejojn. Aŭspiciis Jugoslavia Nacia U.N.E.S.C.O.-Komisiono. Partoprenis 184 pedagogoj, profesoroj, instruistoj. La unua konferenco celis krei “Ĝeneralaj principoj kaj organiza kado”, la dua, kiu devus okazi en 1965, havus la celon “konkretigi la programon por la interlernejaj aktivecoj”.

(17/9/1963) okazis ILEI-kunsido en Saint-Vincent, kun noto de tiuj okazas “ĉiam en septembro de ĉiu jaro, dum la naciaj kongresoj” (t.e. la italaj – Mario Dazzini estis Prezidanto)

En **1964**, aperis la “Lerneja Bulteno N-ro 1” “pro manko de pedagogia revuo” en la marta eldono de la Revuo Esperanto, kun anonco de la estraro de UEA nomis “Konsulta Komisiono pri Lernejoj” (Lapenna, Malmgren, Markarian, Zlatnar)

En **1965**, informoj pri du aranĝoj:

- 1] Devis okazi laŭ presita aliĝilo la “Dua Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata” en Anglujo 13-20 aŭgusto (vidu 1963). Evidente prokrastiĝis ĝis 1966.
- 2] Okazis ILEI-kunveno en Rimini en septembro okaze de la Itala Nacia Kongreso de Esperanto

En **1966**, okazis en Graz, Aŭstrio, la dua “INTERNACIA KONFERENCO de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata”, sub aŭspicio de UEA, ILEI, kaj UNESKO-Komisiono, 23.7-28.7.

1^a 1967

Anonciĝis en cirkulero de 14/XII/1966:

“Asembleo de ILEI. Dum la Universala Kongreso, kiu okazos en Tel Aviv venontjare, kunvenos por la unua fojo la Asembleo de la Ligo.”

Do devis okazi la unua asembleo / konferenco kadre de UK, kiu tamen pro la milito devis okazi en Roterdamo. *Nekonata: Ĉu tiu Asembleo realiĝis en Roterdamo dum la tiea UK?*

Povis okazi 4 aranĝoj de ILEI dum 1967, tamen neniu ankoraŭ konfirmita per skriba raporto (mi daŭre esploras)

Informilo de Jeanne Dedieu, Prezidanto de ILEI:

“La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kunvenos en INNSBRUCK en la Kadro de EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO (23-30 Julio 1967) aranĝita de Aŭstria Esperanto-Federacio, kaj invitas al ties partopreno kun bonvenigo al la PUBLIKA KUNVENO (27.VII) ĉiajn esperantistajn instruistojn” (noto ke eblos flugi al Tel Avivo – por la UK – kiu devis esti ŝanĝita al Roterdamo). En tiu letero ŝi memorigas pri tiu decido al D-ro Istvan Szerdahelyi, kiu deziris ke la aranĝo okazu en Hungario. Presita poŝtkarto tamen indikas la jenon: “IV-a INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-SEMINARIO Szeged, Hungario, 10-20 de Aŭgusto 1967” (Informoj: Szeged, Aprilis 4 útja 1.)

Notu: Do en 1967 povis okazi:

- 1] La “Unua Asembleo de ILEI” en Roterdamo dum UK
- 2] Kunveno (ĉu nur unutaga? tutsemajna?) en Innsbruck, Aŭstrio
- 3] IV-a Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario en Szeged, Hungario
- 4] La tiam kutima septembra Jarkunsido de ILEI kadre de la Itala Kongreso (Dazzini).

2^a 1968

“Internacia Instruista Konferenco”, 20-29 septembro
“Kadrotemo: Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj”
(tre specifa fokuso, ne pedagogia, ne tipa ILE-konferenco)

Notu: tre specifa temo (aldonu al la retejo) kun subtemoj, ĉio laŭ tiu direkto.

1972

Kunordiga Konferenco de la Regiono I de ILEI, en la Ĉefurba Kulturdomo de Budapeŝto, Hungario, 18-19 Julio. (Partoprenis Valev, Bacev, Szar, Radvanszky, Ingusz, Ingusz-Barabas, Ricsei, Haszonits, Dazzini x 2, Prebil, Vetrih, Zlatnar x 2, Antonijevic, Sonnabend, Haupenthal x 2)

7^a 1973

Maribor, 2 sinsekvaj aranĝoj:
18-20 Julio, “La VII-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn”
20-26 aŭ 21-27 Julio, “Internacia Instruista Konferenco”
En decembro eldoniĝis varba numero de la nova serio de IPR.

1974

Devis okazi somere laŭ antaŭaj planoj sub gvido de Geza Kurucz la 5-landa renkontiĝo de lernantoj kiuj lernis dum tri jaroj, do 25 lernejoj el 5 landoj = entute 125 lernejoj.
(Ĉu ni povos konfirmi ke tiu aranĝo okazis? Ŝajne estis neeble realigi pli vastajn planojn tiam aŭ poste ĉar la Pola ministrino pri edukado kiu pretis esti ĉefsponsoro subite mortis – multo esplorenda pri la sinsekvo de konferencoj, eksperimentoj ktp.)

9^a 1975

Temo: “Edukaj kaj lernejoj demandoj en la kadro de nova UNESKO-plano”